


# Boletín<sup>★</sup>

de la Federación Española de Esperanto



nº 307 - (AUG.) SEPTBRO - OKTOBRO - 1992

# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

## HEF

(Informado kaj Administrado)  
Federación Española de Esperanto  
(Información y administración)

c/ Rodríguez de San Pedro  
13, 3º, p-7.  
28015 MADRID  
Telefono: (91) 446-80-79

## Estraro

*Prezidanto:* Antonio Alonso Núñez  
*Sekretario:* Manuel López Hernández  
*Vicprezidanto:* Alberto Franco Ramirez  
*Vicsekretario:* Luis Gil Pérez  
*Kasisto:* José M<sup>a</sup> Bernabeu Franco  
(Konto: 14.011.966 de Caja Postal)

## Ĉef-redaktoro

Antonio Marco Botella  
Av. Compromiso de Caspe, 27-29, 9º C.  
50002 ZARAGOZA

## Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell  
Miguel Fernández Martín  
Vicente Hernández Llusera  
Andres Martín González  
Luis Serrano Pérez  
Miguel Gutierrez Aduriz  
Antonio Valén Fernández

## Kovrilo:

Ponto al la insulo "La Cartuja", kie situas la  
Universala Ekspozicio-92 de Sevilo.

## Noto:

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la  
aŭtoroj mem.

## ENHAVO

Hieraŭ kiel hodiaŭ <i>Antonio Marco</i> . . . . .	3
Glosaro de esperantaj mallongigoj, sigloj kaj akronimoj <i>Bernard Golden</i> . . . . .	4
Niaj ebloj: historia tempo . . . . .	7
Pri hispana-esperanta vortarego . . . . .	8
Alitipa legado de Don Kihoto <i>Luis Serrano Pérez</i> . . . . .	10
Viglas la movado . . . . .	12
Ŝtelistoj en HEF <i>Marcos Cruz</i> . . . . .	13
Laboremuloj ne mistrafu la celon <i>Marcos Cruz</i> . . . . .	13
Recenzoj: Sferoj-7 <i>Antonio Valén</i> . . . . .	14
Novaj spuroj en Hispanio <i>Gonçalo Neves</i> . . . . .	15
Trarigardo al la skribado <i>Alberto Franco</i> . . . . .	18
Originala poezio: Ni <i>Gonçalo Neves</i> . . . . .	21
Utilaj adresoj . . . . .	21

# Hieraŭ kiel hodiaŭ

Unuafoje post trijara redaktado de "Boletín", la nuna redaktora skipo travivas sperton, principe ne tro plaĉa al ni. Temas pri publikigo de bulteneto kun informaj paĝoj en la hispana lingvo ene de nia revuo.

Jam antaŭ longe, okaze de estrarkunveno en Zaragozo, oni proponis publikigi tiun kvazaŭan Informbultenon en la hispana, kun la celo komuniki al la informagentejoj, amaskomunikiloj, informkanaloj kaj al niaj propraj lingvokomencantoj la plej gravajn novaĵojn pri nia Movado kaj aktivado. En tiu estrarkunveno, la propono estis ĝenerale bone akceptita, escepte de la ĉefredaktoro de "Boletín", kies opinio estis/estas redakti nian organon nur *en Esperanto*. Tial, se firma estus la decido pri redaktado de nia organo, parte aŭ tute en iu nacia lingvo, oni devos kalkuli pri lia nepra demisio. Fakte, tiu propono fidele reproduktis similan debaton en Madrido, kiam la nuna ĉefredaktoro ekokupis la postenon. Tiam oni konsentis redakti "Boletín" nur en Esperanto.

Dum la lasta kongreso en Merido, oni denove prezentis al la konsidero de la estraro la iaman proponon pri publikigo de Informbulteno en la hispana. Oni redebatis la proponon kaj oni venis al jena decido:

- a) Oni publikigos "Boletín" kiel ĝis nun, tute en Esperanto.
- b) Informbultenon en la hispana oni publikigos ĉiam, kiam la HEF-estraro konsideros tion oportuna por la menciita celo.
- c) Tiun Informbultenon verkos aparta Redakcio sub la rekta respondeco kaj indikoj de la HEF-prezidanto.
- d) Eventuale, kiam ambaŭ revuoj koincidos en presejo, oni povos ŝparcele sendi ilin kune.

Jen kial vi, HEF-membroj, ricevas ĉi-foje "Boletín" kun apartaj informpaĝoj en la hispana, pri kies periodeco nia nuna redaktora skipo tute ne respondecas.

Evidentas, ke la temo pri publikigo de nacilingvaj bultenoj, kun propaganda varbocelo aŭ informado por amaskomunikiloj, ne estas problemo nur nialanda, sed respondas al la bezonoj de nia aktuala socio, ĉar nia mesaĝo ne devas limiĝi al niaj propraj medioj...

Verŝajne, ankaŭ UEA komprenis tiel la aferon, ĉar ni ĵus legis, ke ĝi pretas helpi per sia Informservo la lokajn redakciojn per provizo de informoj el diversaj fontoj.

La Redakcio de "Boletĥn" bone komprenas tiun problemon, sed preferus, ke tiuj nacilingvaj taskoj iru laŭ aliaj vojoj kaj rimedoj, ĉar esperantista revuo havas tute apartan kaj specifan rolon.

Hieraŭ kiel hodiaŭ, ni, kiel esperantistoj, ankoraŭ ne bone komprenis kiel esperantista revuo povas uzi nacian lingvon en siaj paĝoj.

Sincere, neniam mi tion komprenos!

*Antonio Marco Botella*

---

## *bezonata konsultlibro*

### **GLOSARO DE ESPERANTAJ MALLONGIGOJ, SIGLOJ KAJ AKRONIMOJ (GEMSA)**

#### **Plendo kontraŭ kaosa situacio**

Du fojojn en la pasintaj monatoj, legantoj de la magazino "MONATO" plendis pri la nekomprenebleco de mallongigoj aperantaj en publikigitaj tekstoj en la periodaĵo, kaj postulis, ke la redakcio ne uzu ilin. Tio apenaŭ estas sekvida konsilo, ĉar la kutimo ŝpari spacon kaj eviti jam profunde enradikiĝinta en etnolingvoj, do estas tute nature, ke ankaŭ la vivanta lingvo Esperanto utiligas tiun rimedon. La aspekto de la afero, kiun ne tuŝis la plendantoj, temas pri neeblo facile trovi la signifojn de la mallongigoj,

signoj kaj akronimoj en ekzistantaj konsultlibroj en Esperanto.

Tre malofte aŭtoroj aŭ redakcianoj degnas glosi la mallongigojn en siaj tekstoj, jen interrompe, jen piednote. Cetere, la formado kaj uzado de mallongigoj estas evidente kaosaj, kun la rezulto, ke legantoj ofte alfrontas enigmoludon. William Gilbert lanĉis diskuton pri tiu problemon en sia kontribuado al la "Lingva Angulo" de *Le Travailleur Esperantiste* (n-ro 159, 1991, pĝ. 5) kaj mi aldonis komentojn en mia artikolo "Prononcado kaj glosado de mallongigoj, sigloj kaj akronimoj" en la

sama revuo (n-ro 162, pĝ. 5-6 kaj n-ro 163, pĝ. 8-9).

Listo de mallongigoj troviĝas en *Plena Ilustrita Vortaro*, eldonita en 1970, sed ili ne estas kompletaj, kaj la *Suplemento*, publikigita en 1987, ne aldonis novajn registraĵojn. En 1982 aperis en Germanio *Listo de Mallongigoj*, kompilita de R. Hauptenthal surbaze de materialo preta jam en 1972. Sekve, mankas en tiu magra broŝuro abundo da mallongigoj, kiuj estis ekzistaj en la postaj du jardekoj. Ne estas indiko, ke la kompilinto intencas publikigi novan eldonon de tiu verko. Nuntempe pli granda kompilaĵo estas preparata de Tibor Papp el Debreceno, Hungario. Li komencis registri mallongigojn, siglojn kaj akronimojn sur slipoj kaj tajpis kelkajn paĝojn por eventuala publikigo en *Debrecena Bulteno*.

Dank' al la afableco de la kompilanto, mi havis okazon rigardi ilin, do mi povas prijuĝi la labormetodon de S-ro Papp. Mia impresio estas, ke la nova projekto estas tro ambicia, ĉar la celo estas kompili verkon enhavantan ne nur mallongigojn uzatajn en Esperantaj kunteksto, sed ankaŭ tiujn en la hungara lingvo kaj, aldone, mallongigojn konatajn pli-malpli internacie. Tio signifas, ke en la verko enestis materialo ĉerpita el multaj etnolingvoj. Efektive, estas kimera la espero kompili *kompletan* liston de mallongigoj, simboloj, sigloj, signoj kaj akronimoj.

Ekzemple, la unua eldono de la germanlingva *Grosses Abkürzungsbuch* (1983) estas kvincentpaĝa, kaj la nova eldono estas eĉ pli ampleksa.

Vere, estas neeble scii, kie haltigi la kompiladon. Mia opinio, estas preferinde rigore limigi la enhavon de la kompilita glosaro al tiuj mallongigoj, sigloj kaj akronimoj, kiuj plej ofte troviĝas en Esperantaj tekstoj, ĉu ili devenas de Esperantaj fontoj, ĉu ili estas internaciaj kiel tiuj de la sciencoj kaj la komerco, poŝtaj kodoj, aŭtomobila nacieco ks.

### Fremdlingvaj nomoj

Apartan problemon okazigas la uzo de la siglo de la etnolingva nomo de organizaĵo, dum nur la tradukita Esperanta nomo troviĝas en Esperanto-publikigaĵoj. Jen du ekzemploj.

APS- *Amerikan Philosophical Society* (Amerika Filozofia Societo).

FISAIC- *Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots* (Internacia Federacio de Kulturflugantaj Fervojistoj).

Ambaŭ nomoj de ĉiu organizaĵo devas havi sian siglon. Estas facile elekti AFS kiel la Esperantan ekvivalenton de APS, sed oni hezitas pri la esperantigo de FISAIC, ĉar la Esperanta titolo ne estas fidela traduko de la franca

nomo. La esperantistaj fervojistoj mem devas solvi tiun anomalian problemon.

## Racia formado de mallongigoj

Tasko de redaktanto de glosaro de mallongigoj estas ne nur registri materialon sed ankaŭ provi fari ordon, malrekomendante siglojn havantajn la saman formon kun pluraj signifoj, kaj proponante novajn mallongigojn por anstataŭi tiujn, kiuj estas ambiguaj. Okulfrapa ekzemplo estas SEA, kiu havas kvar signifojn:

LKK      PAC  
SEA      BBC      HIEF      ICE  
PEA  
EK      uea      UN      GID  
UNESKO  
DIV      ELKA      RIZ      FISAIC  
UNCED      TEJO

Sarlanda Esperanto-Asocio.  
Socialista Esperanto-Asocio.  
Sudafrika Esperanto-Asocio.  
Slovakia Esperanto-Asocio.

Estas eble eviti tiun ambiguecon, se la ordo de vortoj en la titolo de la organizaĵo estas modifita.

SEA- Socialista Esperanto-Asocio.  
EAS- Esperanto-Asocio de Sudafriko.  
ASE- Asocio de Slovakaj Esperantistoj.

Jam okazis ŝanĝo de vorto en la nomo de la sarlanda asocio, kiu nun estas Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL). Sed ankaŭ SEL estas ambigua, ĉar uzas ĝin du aliaj organizaĵoj:

Serbia Esperantista Ligo.  
Skolta Esperantista Ligo.

Iliaj titoloj estas facile modifeblaj jene:

ELS- Esperanto-Ligo de Serbio.  
LES- Ligo de Esperantistaj Skoltoj.

## Prononcebleco de sigloj

Estas rekomendinde formi siglojn, kiuj estas facile prononceblaj same kiel vortoj; ekzemploj estas BEL (Bahaa Esperanto-Ligo) kaj EVA (Esperantlingva Verkista Asocio). Alimaniere, estas necese prononci ilin laŭ la nomoj de la literoj kiel LSG "losogo" (Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj) kaj NBN "nobono" (Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturato).

## Starigo de principoj

Kompilantoj de mallongigoj devas ankaŭ starigi principojn por formi ilin surbaze de novaj vortoj kaj titoloj, tiel, ke ili konformu simetrie al aliaj mallongigoj apartenantaj al la sama kategorio. Analogie kun la paro "s-ro/s-ino" devas esti uzataj "d-ro/d-ino" (ne "d-rino") kaj "k-do/k-ino" (ne "k-

dino"). La kutima mallongigo de "profesoro" estas "prof." (ne "prof.ro" kiel en *La Eta Gazeto*); sekve, la ina formo estas "prof-ino" (ne "prof.no"). Rimarku, ke la uzo de majuskloj aŭ minuskloj por la mallongigoj de titoloj de personoj kaj por kelkaj aliaj vortoj nuntempe ŝajnas tute arbitra.

Bernard GOLDEN

## Niaj ebloj: historia tempo

Oni rajtas fari al si la demandon, ĉu la legantoj de "Boletŝn" konscias pri la nuna situacio de la hispana esperantismo. De kelkaj jaroj -eble nerimarkite- la aleksteraj produktoj el nia lando, la videblaĵoj do, fruktas iom post iom, sed firma-paŝe. Senriske ni kuraĝas veti, ke la venontaj kvin, dek jaroj alportos prestiĝon al la hispana esperantismo, kaj enlande kaj eksterlande. "Eble nerimarkite", ni skribis. Jen faktoj: la *Sferoj*-serio atingis jam sian sepan volumon kaj trabatis al si pli vastan rekonon kaj diskonitecon ĉe ĉiu nova libro. Grupo NIFO nun planas ampleksigi kaj diversigi sian oferton per du novaj serioj, nome, pli granda por romanoj kaj pli malgranda por kapti ĉipemajn, eble trajn-literaturajn klientojn.

En 1991 aperis sub la ŝildo de la eldonejo Berkeley la libro *Sur la linio*, de nia ĵusa akademiano Georgo Kamaĉo. Nur unu rimarko: *pluraj el ĝiaj rakontoj naskiĝis klasikaj*. Ni povas nur bedaŭri ties tepidan prirecenzon en la pasinta numero de "Boletŝn", ĉar ĝi apenaŭ bildigas la eksterordinaran gravon de *Sur la linio* en la literatura areno de Esperantujo.



Eble dum la venonta jaro eldoniĝos komuna poemaro de kvar iberiaj poetoj (tri hispanoj kaj unu portugalo) sub la eventuala titolo *Ibere libere*. Tiu libro nepre postlasos spurojn en la Esperanta literaturo pro sia alta nivelo lingva kaj -certe- literatura. Bonvenon!

Nun almenaŭ tri lernolibroj adaptiĝas por hispanlingvanoj: la prestiĝa *Zagreba metodo*, *Teach yourself esperanto (Lernu mem Esperanton)* kaj *Gerda malaperis*.

Bonas superi la ĝisnunajn elementajn instruilojn en la hispana, cetere iom eksmodajn.

Ankaŭ dum la venontaj jaroj aperos la universitat-nivela editorado kaj trastudo de nia *Fundamento* kun paralela traduko en la hispanan. Same


universitat-nivelaj estos la kompleta informilo en la hispana *Información detallada sobre el Esperanto* -kun detalaj informoj pri la lingvo, literaturo, historio kaj kulturo de nia komunumo- kaj la traduko en la hispanan de la jam klasika studo *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, verkita en 1978 de la konata lingvisto John C. Wells.

Sune centre de tia senprecedenca panoramo situas la impona vortarego hispana-esperanta de Fernando de Diego, kiun ni prikomentas en aparta artikolo.

Ĉu eblas traduki nian ĝojon en vortojn? Neniam ĝis nun disvolviĝis tioma kaj tiela aktivado en nia lando, neniam oni povis aŭguri al la hispana esperantismo pli brilan estonton kaj pli solidan marŝon. Kara leganto: pripensu la nunajn eblojn de nia lando en la Esperant-lingva mondo kaj bonvolu relegi ĉi liniojn post kelkaj jaroj. *Tiempo al tiempo...*

LA REDAKCIO

## Pri hispana-esperanta vortarego



Jam de longa tempo, Fernando de Diego kompilas hispana-Esperantan vortaregon, kiu entenas fakte la tutan frazeologion, kliŝojn kaj parolturnojn de la hispana en Esperanton, kio ja mankegas en la elementaj vortaroj -fakte, vortolistoj- de Tudela kaj Paluzie (*Lexicón Sopena*). Oni kompostos tiun trezoron ĉe la brazila eldonejo *Fonto*. Temas ja pri giganta laboro, sed necesega, por ke la esperantistoj sciu kiel traduki, ekzemple, "echar un pulso", "toque de queda", "aterrizaje forzoso", "apurarse la barba" kaj tiel senfine, kies ekvivalentoj troviĝas en ĉiuj naci-lingvaj vortaroj (pensu, ekzemple, pri la hispana-franca *Larousse* aŭ la hispana-angla *Collins*).

Tiu vortarego estos epok-fara unikaĵo en Esperantujo, ĉar la hispanlingvaj esperantistoj disponos vortaron superan al kiu ajn alia nacilingva-Esperanta. Ni povas nur esprimi nian ĝojon ĉe la titana vorto-aventuro entreprenita de la plej kompetenta hispanlingva esperantisto. Jen



prov-paĝo, ne definitive redaktita, de la vortarego, por ke vi konstatu ĝian amplekson kaj antaŭfrandu ĝian guston:

**AGENTE.** Aganto: *agente atmosférico* — atmosfera aganto; *agente químico* — kemia aganto. Agento: *agente de bolsa* — bors-agento; *agente de seguros* — asekur-agento, asekuristo; *agente de colocaciones* — dung-agento. Re prezentanto: *tú serás mi agente en el extranjero* — vi estos mia reprezentanto en la eksterlando. Policano: *agente de la circulación* — trafika policano.

**AGERMANADO.** German-imita; germanizita.

**AGIGANTADO.** Giganta: *a pasos agigantados* — gigant-paŝe.

**AGIGANTAR.** Troigi: *no hay que agigantar lo que pasa* — oni ne devas troigi tion, kio okazas. Pligrandigi: *este acontecimiento agiganta el problema* — ĉi evento pligrandigas la problemon.

**AGIGANTARSE.** Enormiĝi, akiri gigantajn proporciojn.

**AGRUPA.** Pirozo.

**AGUA.** Akvo: *dame agua* — donu al mi akvon. Pluvo: *cae mucha agua* — falas forta pluvo, falas multe da akvo. (Pl.) larmoj. (Fig.) Akvo: *diamante de mas puras aguas* — diamanto de plej pura akvo. Muaro (telas). (Mar) akvo-truo; tajdo; akvo-sulko. (Pl.) marfluo: *las aguas nos llevan hacia el sur* — la (mar)fluo portas nin suden. *Agua acerada* — fer-akvo; *agua bendita, cibera, cruda o gorda, corriente, de azahar, blanda destilada* — akvo sankta, irigacia, dura, flua, oranĝo-flora, mola, distilita; *agua de cal* — kalk-akvo; *agua de limón* — limonado; *agua de espliego* — lavend-akvo; (Fam.) *agua de cepa* — vino; *agua de fregar* — teler-akvo; *agua de lejia* — lesiv-akvo; *agua de mar* — mar-akvo; *agua de lluvia* — pluv-akvo; *agua de manantial* — font-akvo; *agua de olor* > — tualet-akvo; *agua de seltz* — selters-akvo, sod-akvo; *agua de sifón* — sod-akvo; *agua de rosas* — rozakvo; *agua dulce* — sensala, dolĉa akvo; *agua estancada* — stagna akvo; *agua fuerte* — fortakvo; *agua natural* — kran-akvo; *agua oxigenada* — oksigena akvo; *agua regia* — reĝ-akvo; *agua salada* — sala akvo; *agua salobre* — sal-gusta akvo; *agua de creciente* — ascenda tajdo; *agua de menguante* — descenda tajdo; *agua potable* — trink-akvo; *agua pesada* — peza akvo; *agua madre* — patrino likvaĵo; *aguas muertas* — febla tajdo; *aguas sucias o residuales* — postlava, kloaka akvo; *aguas jurisdiccionales* — teritoriaj akvoj; *aguas termales* — term-akvoj; *aguas abajo* — laŭ la fluo; *aguas arriba* — kontraŭfluo; *pera de agua* — mol-matura piro; *tejado de dos aguas* — duklina tegmento. (Fig.) (Fam.) *ahogarse en un vaso de agua* — droni en akvo-glaso; *algo tendrá el agua cuando la bendicen* — se oni diras ion brila, eble ĝi brilas; *bailarle a uno el agua* — ĉirkaŭflati iun; *bañarse en agua de rosas* — vidi la mondon tra rozaj okulvitroj; *agua corriente no mata la gente* — akvo kura, akvo pura; *como pez en el agua* — kiel fiŝo en akvo; *cubrir aguas* — tegmenti konstruatan domon. (Am.) *dar agua a*

*alguien* — mortigi iun; *del agua mansa me libre Dios, que de la brava me guardaré yo* — atentu la silentan pli ol la bruantan; akvo silenta subfosas la bordon; *echar agua en el mar* — verŝi akvon en la maron; *echar al agua* — bapti; *echarse al agua* — ĵeti sin en la fajron; riski sin en edziĝon. (Am) *estar como agua para chocolate* — boli de kolero; *estar con el agua al cuello* — havi la ŝnuron ĉirkaŭ la kolo; *estar entre dos aguas* — teni sin en la mezo; profiti de ĉiu flanko; scii naĝi laŭflue kaj kontraŭflue; *estar hecho un agua* — droni en ŝvito; *gastar dinero como agua* — ĵeti ĉirkaŭen spesojn kaj spesmilojn. (Am) *hay agua puesta* — ŝajne pluvos; *irse al agua* — fiaski, bankroti; *hacer aguas mayores* — ekskrementi; *hacer aguas menores* — ellasi akvon; *llevar el agua a su molino* — porti akvon al sia muelilo; *nadie diga de este agua no beberé* — kion vi ne trinkis vole, tion eble vi trinkos nevole; *quedar en agua de borrajas* — solviĝi en nenion; *romper aguas* — elflui la amnia likvo; *sacar agua de las piedras* — eĉ ŝtonon melki; *se me hace la boca agua* — mia buŝo salivumas, bavas; *ser mas claro que el agua* — esti klara kiel kristalo; *venir como agua de mayo* — veni kvazaŭ vokite kaj petite; *se mete en agua el tiempo* — la vetero enpluviĝas; *como quien se bebe un vaso de agua* — facile, kiel trinki akvon el glaso;  *pescar en aguas turbias* — en akvo malklara oni fiŝas facile; *¡hombre al agua!* — homo en la maron!; *¡agua va!* — atentu akvoĵeton!

**AGUACATAL.** Avokad-plantejo.

**AGUACATE.** Avokado; avokado-arbo (Am)(Fam) stulta.

**AGUACERO.** Ekpluvego: *cayó un aguacero* — falis ekpluvego. (Am) lampiro

## ALITIPA LEGADO DE DON KIĤOTO



Mi havis la ŝancon preni parton en la Merida Hispana Kongreso, kaj krome oni permesis al mi prelegi pri nova kaj malnova literatura juvelo, kia ja estas la verko de Cervantes, Don Kihoto. Kiucele mi pretigis tiun prelegon, se oni jam skribis centojn da tezoj pri Cervantes kaj Don Kihoto? La respondo estas facila. Mi ofte legis pri la alta literatura nivelo de nia fama verko, sed neniam mi legis pri la socia mesaĝo, kiun enhavas Don Kihoto.

La kondiĉoj sociaj regantaj tiutempe estas alia temo, kiu tre interesas min. Ĉio abunde troviĝas en la menciita verko. Malofte la socia reganta klaso akceptas kritikojn malfavorajn, kaj ĉiuj bone scias, ke dum la regado de la fifama inkvizicio la vivo ne estis rozkolora.

Jam en miaj tre junaj jaroj mi legis Don Kihoton, sed tre supraĵe. Mi ne scias, ĉu la instruisto komprenis ĝian riĉan enhavon laŭ socia vidpunkto, sed la fakto estas, ke li nenion klarigis al ni. Poste, kiam mi persone devis alfronti la vivon, la legado de Don Kihoto (mi legis ĝin plurajn fojojn) vekis en mi alian intereson, ol tiun de la stultaĵoj de Don Kihoto, kiuj tiom amuzis min antaŭe. Mi tuj komprenis, ke Cervantes deziris diri ion: li deziris esti notario pri la tiutempaj vivkondiĉoj. Vi ja povas kompreni, ke tiu tasko, tiu deziro ne estis facile realigebla. Do, li devis serĉi ion por kaŝi siajn intencojn. Ne facilas skribi pri io kaj ne menci i kion ni deziras ekspliki, klarigi. Por tion fari oni devas esti ege ruza.




Cervantes bone sukcesis, pere de la personeco reprezentata de Don Kihoto. Kompreneble, Cervantes riskis, ke lia verko ne estos komprenata; cetere, ankoraŭ ekzistanta risko.

Pere de Don Kihoto, mi volas scii pri la vivo en tiu periodo de la hispana historio. La tuta verko estas severa kritiko kontraŭ la socia klaso tiutempe reganta. Cervantes ne povis "uzi" kiel protagoniston nur sinjoron devenantan de la alta socio. Por klarigi bone la tiamajn vivkondiĉojn, li serĉis alian rolulon el la plej malalta kategorio socia, la bonkoran Sanĉo Panza. Kiom inteligente Cervantes "manipulis" tiujn du personojn. Kiam Cervantes deziris klarigi ion pri la tiutempa socio, li lerte paroligis tiujn du rolulojn, kaj se necese, li aldonis fremdan akompananton. Ofte, la tekstojn de Cervantes oni devas kompreni laŭ vorte male. La stultaĵoj de Don Kihoto estas la kurteno per kiu Cervantes kovris la realan vivon tiutempan.

Sed krom nia intereso koni la vivon en tiu epoko, mi ĝin analizas kaj komparas kun tiu nuntempa. Mia intenco estas scii, ĉu ni progresis, aŭ male ni troviĝas en sama situacio, kiel tiu rakontita de Cervantes; ĝuste tiam, la verko de Cervantes akiras senmezuran valoron, kiel ateston de la stultaĵoj faritaj kaj farataj de la homo. La konsiloj, la proverboj, la diraĵoj de ambaŭ roluloj, estas ankoraŭ hodiaŭ aplikeblaj al nia vivmaniero. Ŝanĝiĝis la vivoformo, sed la mizero ekzistanta en la epoko de Cervantes, daŭre troviĝas inter ni. Kiam ni legas multajn el la situacioj de lia Kihoto, ni devas konkludi, ke la homo estas la eterna fiaskanto.

*Luis Serrano Pérez*

# Viglas la movado



## Esperanto domo en nico

Se vi deziras restadi ĉe la *Franca Lazura marbordo* helpu al la kreado de Esperanto-Domo en Nico. La donacitan monon vi uzos por pagi vian restadon en Nico po 100 ff. (30 DM) por unu nokto kaj unu aŭ du personoj.

Petu informilon al : NICE-ESPERANTO; Hortensias, 2. 121 B.Bld Napoleón III. 06200 NICE. Francio.

№ 0006 aparta donacilo



## Peranto de "EVENTOJ" en Hispanio

De nun la hispanaj esperantistoj kiuj abonis tiun dusemajnan revuon povas pagi la kotizon al la landa peranto: Juan Azcuénaga Vierna; Gral. Dávila, 127.P-7.2º izq. E-39007-SANTANDER (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal nº 03548-531 (O.P.)

---

**HEF** Kontonumero  
Nº 14.011.966  
de Caja Postal

---

## Verko pri Esperanto en Callosa de Segura

La urbestro de tiu ĉi urbo eldonis en la pasinta monato Junio plian volumon de la serio "Monografías callosinas" sub la titolo "60 AÑOS DE ESPERANTO", verkita de nia samideano Antonio Marco Botella. La verko estis publikigita okaze de la III-a Kongreso de la Valencia-Murcia Federacio ĵus okazinta en la menciita urbo.

## Ĉu vi konas tiujn ĉi librojn?

Famaj poeziaj verkoj de prof. Ŝulco Rikardo:


"La Mago", 99 majstraj pantu-  
netoj, 213 pĝ. . . 19,80 DM.

"La trombonoj de Jeriko", du-  
lingva, 65 pĝ. . . . 12,80 DM.

"Abismo/Abyssos", 24 sonetoj  
+ 24 litografoj, . 14,80 DM.

Mendu ĉe via Libro-  
Servo aŭ rekte ĉe la eldonejo  
"Esperanto-Centro", D-W-4790.  
PADERBORN. Germanujo.

## Ŝtelistoj en HEF



Malfrunokte la 22an de julio ŝtelistoj umis en la kons truaĵo kie situas la HEF-oficejo. Kelkajn pordojn ili rompis, kaj sendube ili estas malkleruloj, ĉar ili celis ankaŭ la esperantejon... tio pruvas, ke ili ne konas esperanton. Tamen, ili agis iom esperantisteske: ili faris fuŝan truon apud la seruro, ekvidis la enon kaj ne plu penis! Nur la HEF-oficeja pordo estis rompita en la tria etaĝo. Kelkaj aliaj allogis la fuŝulojn en aliaj etaĝoj, kaj en kelkajn oficejojn ili eniris kaj detruis serĉis valoraĵojn.

Tagmeze la pordisto telefonis min por sciigi, kaj mi iris tien; vespere la pordo estis provizore riparita. Ŝajne asekuro pagos novan pordon, kaj probable ni profitos la ŝanĝon por plifortikigi ĝin.

Nun demandindas: Kio rezignigis la sentaŭgulojn? Ili vidis ion timigan. Sed tra la truo, mi konstatis, oni povis vidi nur la modernan kaj belan aspekton de la lernoĉambro kaj la kartonajn skatolojn enhavantajn la pene ordigatan librotekon en la laborĉambro...

### Laboremuloj ne mistrafu la celon

En lasta flugfolio de madrida loka esperanto-grupo aperas hispanlingva anonco, ke ĉi tiu grupo vendos al hispanaj esperanto-grupoj post some-ro lotierojn cele pagi kostojn de la HEF-oficejo. Tamen, nek la respondeculoj de la HEF-oficejo, nek la

prezidanto mem de tiu loka grupo scias pri la afero. Atentu do, ĉar verŝajne temas pri misanonco aŭ simpla eraro.

Ĉiuj kiuj iel ajn povas apogi la laboron faratan en la HEF-oficejo, bonvolu kontakti rekte la HEF-oficejon mem.

La plej peniga laboro baldaŭ finiĝos: estas multaj materiaj plibonigoj de kiam okazis la lasta HEF-kunsido, kaj post longa peno la materiaj kondiĉoj jam sufiĉe decas por oferti servojn al la publiko, do la ekdenuna laboro konsistos precipe el organizado de tiuj servoj. Kvankam mono estas helpo, nura necesajo por atingi la celon estas plua kaj realmondeca laboro. Ekzemple, en julio okazis speciala kurso tri tagojn semajne, sed samtempe la teamo plu laboris en la alia ĉambro pri farbado de fenestroj, muntado de tirkurtenoj, novaj bretaroj, nova kunsidotablo, ordigado de libroteko, respondo de leteroj, administraĵoj, kps. La etoso pli kaj pli viglas, kaj homoj emas veni labori pli regule. Du pliaj junuloj, sukcesaj lernintoj, jam aliĝis al la kontraŭkrokodila teamo de regulaj laborantoj, kio plirapidigas la agadon.

La tutan someron ni dediĉos al la lastaj materiaj plibonigoj de la oficejo, al la pretigo de la nova instrumaterialo kaj al dispoŝtado de unuaj bonkvalitaj cirkuleroj al lernuntoj kaj ĵurnalistoj, cele la celon: ekvivigi la ejon per ĝiaj propraj servoj, ne per almozado.

*Marcos Cruz*



# Recenzoj

SFEROJ 7, Santander, Eld. M. Gutiérrez  
Adúriz, 1992, 134 p., prezo: ĉ. 1000 p-toj.

Sep: magia numero laŭ la antaŭparolo, trafa laŭ la enhavo, preso kaj aspekto, kaj rekte atuta laŭ la persistemo de la eldonisto. Jam dek jarojn la *Sferoj*-serio plenigas vakuon en nia literaturo; provite, ankaŭ en Esperantio troviĝas aĉetemaj legantoj de scienc-fikciaĵoj, kaj originalaj kaj tradukitaj. Ĉi-foje temas pri tradukoj: 12 rakontoj de 10 aŭtoroj el 3 lingvoj (angla, hispana, rusa) kaj el -minimume- 5 landoj (Usono, Argentino, Urugvajo, Hispanio kaj eks-Sovetunio). La redonoj de Karl Pov el la angla kaj de Liven Dek el la hispana superbas: la vortoj bele fluas en Esperanto senmakula, elasta, eleganta. Kontraste, la traduklaboro de V.V. Ĉarin super la rusa lingvo tre lamas; la leg-plezuro preskaŭ malaperas pro lia teda, peza, bloka lingvaĵo, kiu konstante randas solecismojn kaj aspektas komencantece. Eble ne hazarde la redaktoro lokis la elrusajn tradukojn meze de la volumo.

Pluraj el la 12 rakontoj fakte estas nur tri-kvar-paĝaj anekdotoj: *La dua vojaĝo* de C. Peralta, iom trivita tempo-paradokso; *Difektiĝis Eskuder'* kaj *Okazo sur la planedo OM* de D. Bilenkin, respektive, simpatia kontakto terano-eksterterano iom pli realisma ol kutime, kaj historio pri nehomformaj rezonivuloj; ankaŭ *Rakonto de la homo, kiu estis genio*, de V. Baĥnov, kaj *La alĥemist*, de P.G.M. Calfn, kiujn oni ne povas fini sen rideg-eksplodo. La plej plaĉa rakonto-anekdoto, *Estis foje* de W.G. Mainero, longas apenaŭ duon-paĝon kaj ree disvolvas konatan miton, laŭ kleoj de preskaŭa SF-subĝenro.

Iom pli longa traduko el la rusa, *Homo ekster la ŝipo* (A. Gorbovsĵij), temas pri eksterterano devigata resti sur nia planedo. La fino ne tro surprizas la leganton kaj la traduko ne atingas la postulendon. Same la fino de *La krizalido* (B. Martínez) facile dedukteblas laŭ la disvolvo de la argumento - ĝenerala trajto de rakontoj fronte al romanoj-, sed ĝi kompensas per zorga teknika konstruo.

La brilaj steloj de *Sferoj 7* estas *Svarc inter la galaksioj* de R. Silverberg kaj *Envenu gesinjoroj* de E. Barceló. La unua randas perfektan laŭenhave kaj laŭtraduke: jen la plej eksperimentema Silverberg, la plej matura, la plej teknika. Tiu rakonto ne povas ne sugesti konstrue, stile kaj argumente alian tre ŝatatan -de Silverberg mem- historion: *Sundance* (Sundanco), ĉar ambaŭ montras kiel torde oni povas analizi la realon: kiu el du, tri malsamaj perceptoj aŭtentas? La traduko el Barceló, stranga am-historio, lasas tre melankolian postguston, kvazaŭ dolĉa-amara bombono.



Ankaŭ am-historias -sub bela, tre bela Esperanta vesto- la dua rakonto de Silverberg, *Ismael enamiĝinta*, eble ne tiel melankolie kiel ĉe Barceló, sed same strange kaj delikate.

Nur laste ni menciuj la tuberon *Sangantaj ŝtonoj* de H. Ellison. Kial Karl Pov (ĉar, supozeble, Charles Power=Karl Pov) taksis tradukinda tiun sadisman historion, tiun sangobanaĵon sen arta valoro? Tamen, ja ne unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas: *Sferoj 7* plene rekomendindas. Ĉu eblus malrekomendi ajnan volumon el la santandera serio?

*Antonio Valén*

Kiel anoncite en la kroniko pri la pasinta kongreso de Merido, ni aperigas hodiaŭ parton de la bela prelego de nia portugala samideano Gonçalo Neves. Denove ni petas senkulpigon, ĉar evidentas en tiu ĉi kazo, ke resumo signifas iel kripligi belecon:

## *Novaj spuroj en Hispanio*

La jena prelego prilumos la oran generacion de nunaj literatoroj hispanaj kaj konturos ties ĉefajn trajtojn verkajn. La pinta famulo de nia plejado estas sendube Georgo Kamaĉo, kiu debutis premie en 1989, en la Belartaj Konkursoj de UEA. En la sekva jaro li rekordis samkonkurse, akaparante ses laŭrojn diversajn. Nun la poemoj kaj noveloj de Kamaĉo estas ĝueblaj en pluraj gazetoj kaj ankaŭ libroforme, precipe en volumoj kolektivaj aŭ antologioj. Lastjare eldoniĝis en Kalifornio lia unua verko unuopa. Temas pri la novelaro "Sur la linio", kie kolektiĝas kelkaj liaj premiaĵoj plus aliaj rakontoj dise aperintaj.

La bunto tema kaj forma estas ĝuste unu el la ĉefaj karakterizaĵoj de la verkemo kamaĉa. Lia plumo ja same glatas poeme kaj novele, esee kaj

recenze. Lia stilo elforĝiĝis sufiĉe frue kaj evoluis al riĉa propaĵo, tuj rekonebla pro ties elasto kaj matura fluo, kvankam ĝin foje trajonglas kapricoj leksikaj.

Plej prave asertas Fernando de Diego, ke la stilo kamaĉa ĉefe trajtas pro mirinda ekspluato de la duobla vojo de Esperanto. Alivorte, Kamaĉo ĉerpas elinterne, el niaj strukturoj lingvaj, sintaksaj, vortkonstruaj, plukas el nia *Proverbaro*, el niaj kulturo kaj literaturo, kiujn li ofte citas; kaj same li trinkas ekstere, fluigante en la lingvon novismojn, ĉefe leksikajn, kaj rikoltas ĉe fremdaj kulturoj diversaj, de la finna ĝis la araba, tra la klasika mondo latina kaj greka.


Tri stilerojn mi nepre reliefigu ĉi tie, ĉar ili estas tipaj kamaĉaĵoj. Unu temas pri senpera uzado de prefiksoj kaj sufiksoj, kiujn Kamaĉo dekroĉas el la kutimaj, atendataj vortkonstruoj kaj subite aplikas nude, jen antaŭ, jen post la koncerna vorto, kreante fulmajn impresojn ritmajn. Alia rilatas lian piroteknikan eltrovon de sonefektoj per surprizaj asonancoj aŭ apudesto de sparkaj paronimoj. La lastan stileron karakterizas elspino de hastaj ĉenoj de sinonimoj aŭ vortoj kun kresĉendo signifa.

Tamen la literaturo, nome la prozo, ne konsistas nur en stilo. Sen lertaj intrigoj, sen fortaj personoj, sen tekniko rakonta, la plej bela stilo riskas iĝi nura barokaĵo. Ankaŭ ĉi-rilate Kamaĉo soras alten. La plej frapa eco de lia rakontarto estas profunda, ĉiea, subtilega ironio, kiu foje eĉ tanĝas la limojn de enigmo. Tra liaj paĝoj defilas koŝmaroj kaj spertoj realaj, interplekte, kreante bildojn perturbajn, longe obsedajn postlege. Simboloj, kie povas fonti interpretoj diversaj, eĉ antipodaj. Ĉio ĉi evidentigas grandan maturecon, ne nur lingvan, sed ĉefe kaj pli grave -literaturan. Nekontesteble, Georgo Kamaĉo alrangiĝis merite kaj prave sur la podion de nia literaturo, kaj tie daŭre stelas, por nia ĝuo kaj honoro.

La prikamaĉan parton ĉi-prelegan mi ne ŝlosu sen mencio pri lia poezia produktado, magra ja kvante, sed pensiga, eskvizita teme kaj stile vibra, kompakta. Apartan atenton meritas lia superba poemo "KIEL", kiu kunfandadas ĉiajn rimedojn lingvajn kaj stilajn postulatajn de la moderna poezio. Ankaŭ enhance kaj mesaĝe ĝi plej gravas, ĉar tie, en unu sola poemo ok-strofa, kondensiĝas la ĉefaj ŝtupoj de la formiĝo de nia blua planedo kaj de la homa specio.

Nun mi transiru al la poeto Miguel Fernández. Mi transportu min retro. Ĝis iama Granado. Ĝis la ombraj anguloj kaj freŝaj plaŭdoj ĉi-kvartalaj. De Albaycín. Ĝis ties fasadoj kalkaj, kie ludas rebrile efektoj lumaj. Ĝis tieaj vesperoj kaj noktoj serenaj, kaj ventetoj tiklaj surfrunte, kaj





aromoj legomaj, fruktaj, dum kunvenoj terasaj, arige najbarojn, amikojn, konatojn.

Malgraŭ la mildoj ĉi-lokaj, ĉi-tempaj, ŝvebis tamen ankoraŭ streĉo postmilita. La babilojn hantis buĉo. Ago bestia. La poeto. La poeto murdita. Kelkajn jarojn poste, kiam ekjukos al Fernández la lirikaj kordoj, lin spronos kaj direktos duobla atavismo. La etoso, la scenejo kvartala, kun ties sorĉoj klaroskuraj de strataj lanternoj, ties liriloj fontanaj, basenaj, subteraj; kaj la stringa memoro pri Lorca, la poeto falĉita, vaste legata, studata ĝis ensorbo, ĝis asimilo spirita kaj teknika.

Ĝuste tiaj pilieroj -la lulilo kaj la majstro- pontumis la ekpaŝon kaj pluiron parnasajn de Miguel Fernández, kiu premieris en la jubilea jaro per esperantigo de du teatraĵoj de Lorca. Temas pri la "Sanga nupto" kaj "La domo de Bernarda Alba", kiuj publikigis en la fama serio Oriento-Okcidento.

Tamen la originala produktado de Miguel malfamis dume. Ja, kelkaj lirikaĵoj liaplumaj aperis gazete, sed dise, ignorete, kvazaŭ timide. La jaro 1991-a markis veran turnopunkton en lia kariero. Oni enmanigas al Miguel la organizadon kaj reĝisoradon de la "Unua Lirika Festo de HEF". Jen finfine la okazo, kiun de longe atendas kaj sopiras nia bardo. La eblo kunmeti, koherigi, aranĝi artisme diversajn branĉojn de la belo, cele atingi la plej supran ŝtupon de la Olimpo nuna kaj ĉiama, kie regu la poezio plej fajna, la totala poezio: lirika, muzika, drama, danca, mima, luma, sona, en kuneco.

Influante de la popola tradicio andaluza, inspirite de ĉi ties heroldo Federico García Lorca, Miguel Fernández plenfibre strebas al revivigo de la iamaj romancoj trubaduraj, kiuj harmonie kunfandis la parolan kaj kantan poezion, kiuj spegulu ne ŝimajn konvenciojn teknikajn sed aŭtentan, senperan vibradon de la homa animo, de la vivo mem. Elŝiri la poezion el kabinetaj retortoj, el ĵartelaj sufokoj, kaj revenigi ĝin al ties originaj bivakoj, kie gnomoj kaj feoj pripetolas nian fantazion kaj incitas nian liberon -jen la devizo de Fernández, kiu aplikis ĉiajn talentojn, siajn kaj alies, por tion sukcesigi en la Unua Lirika Festo, dum la 51-a Kongreso de HEF, en La Laguna, Kanarioj.

La lirika festo, kiun nia gazetaro (kaj la leĝera, kaj la klera) unuanime prisilentis, rivelis unuavice kaj finfine -la poeton. Ĉar la trian -kaj pli gravan- parton de tiu festivalo konsistigis lirika-muzika spektaklo, en kiu ne

mankis lumefektoj kaj kies ĉiujn poemojn (kaj ankaŭ interligan tekston prozan) verkis Miguel mem.

Temis pri la samaj poemoj. Aperintaj gazete-dise. Nerimarkate. Sed ĉi-foje ilin koherigis ĵusa mortero, kiu kvazaŭ enblovis novan elanon en la tuton. Kaj el fajnaj poemoj disaj kreigis eskvizita verko solida, rakonta pri magia amciklo, de ekŝpruco ĝis forvelko kaj restarto, tra diversaj avataroj, bremsaj kaj spronaj. Elŝpiniĝis, subtile sed nature, superba lirikaĵo *La profil'de viaj spuroj*. Nialingve, la plej grava ĝisnuna verko tiuĝenra. Ĉar la plej mema. La plej aŭtenta. La plej originala. La plej riĉa trope. Tiam kaj tie ekpaŝis rivalten, surprize sed agnoskende, nia plej talenta lirikisto. Pli aŭ malpli frue, nia brovuma kohorto riverencos laŭe.

*La profil'de viaj spuroj*, kune kun aliaj poemoj de Fernández, disaj sed samfrekvencaj, konfirmas la vastan enverguron de lia verkemo, matura lingve kaj teme. Hontindas tial la ĝenerala neglekto, kiu ŝvebas super lia poezio. Sed lia vervo certe ignoras la ignorantojn, kaj lia plumo plue nin ravas, ĉiam kolose, neniam kulise.

Poeto ĝismedola, Miguel Fernández verkas ankaŭ proze. Li aŭtoris la novelon "Koncerto", unuan eron de preparata antologio, kiu celas prilumi la etoson de la homaj rilatoj dum la pasiaj jaroj de la hispana transiro al la demokratio.

Kvankam troviĝas ĉi-tekste kelkaj spuroj el lia poezia transmondo (la maro, la krepusko k.a.), la prozo de Fernández aspektas sufiĉe sendependa de influoj muzaj. Lia stilo torentas senspire, la leksiko impresas vaste, kaj ĉiujn paĝojn trafluas kaŭstikaj tajdoj, ĉiam vipaj, neniel subtilaj.

---


(La fino de tiu ĉi prelego de samideano Gonçalo Neves, aperos en la venonta numero de "Boletín")

## TRARIGARDO AL LA SKRIBADO

### Ĝeneralaj konsideroj pri lingvo kaj skribado

La skribado okazas sufiĉe poste al la apero de la lingvoj. Ĝi do estas dua-ranga de strikte lingvistika vidpunkto (ĉar el la lingvo dependas, kiel oni poste tuŝos), sed socie gravega kiel homa komunikilo. Pli-malpli 3000 jarojn a.k. aperas la unuaj sumeraj skribaĵoj. Ilia ĉefa uzo estis konservi la lingvon: dum la lingvo (tio estas, la parolado) malaperas rapide, la skribado (aŭ pli ĝuste, la skribaĵoj) konserviĝas por la estonto. Tiun praktikecon donis al la skribado precipe en la unua tempo la religiaj celoj.

La skribado ne ekzistas ĉie kie la lingvo ekzistas. Plejmulto el la lingvoj ne havas skriban sistemon. Por moderna lingvisto ĉiaj lingvoj valoras, negrave ĉu ili havas literaturon aŭ ne. Sed la skribado iĝis tiel grava, ke ĝis la pasinta jarcento, la preskriba gramatiko konsideris certajn lingvojn (la latinan aŭ la grekan) kiel plej gravajn aŭ modelajn pro literaturaj antaŭjuĝoj.



Il. 2

Skribi oni devas lerni, dum oni instinkte ekposedas la lingvon de kiam oni naskiĝas. Oni povas havi plenan kompetenton pri lingvo sen neceso scipovi la skriban kodon. Oni definitive nature kaj aŭtomate lernas la lingvon, ne la skribadon.

Fine ni klarigu, ke la skribado neniam estas perfekta spegulo de la lingvo (eĉ en la tiel misnomataj fonetikaj lingvoj). De psikologia vidpunkto la lingvo elkodigas la pensadon, dum la skribado elkodigas la lingvon. Do ĝi estas du-faza procezo.


### La unuaj skribo-sistemoj

Se strikte paroli, la skribado devenas el desegnado. La unuaj skribo-provoj estas do komunik-celaj desegnaĵoj. Fakte, kiu ajn desegno (pli-malpli arta) havas ian komunikan celon de ne lingvistika vidpunkto; sed ni celas nun tiujn, kiuj montras *mesaĝojn* kun certa kodiga provo. La piktogramoj, ekzemple, kutime vidigas scenojn kun la celo informi iun pri io. Ili, kvankam esence bildaj, montras ian adekvatiĝon al la lingvo. Sintakso iel enŝoviĝas en la desegno-procezo. En la ĉeroka piktogramo (Il. 1) montriĝas logika ordo de ideoj, ia strukturo kiu celas speguli la lingvan sintakson:

Subjekto	Predikato		
	Verbo	Adjektoj	
Dek (homoj)	ŝipas	persekutcele	en nian kampadejon

Kiam tiuj desegnoj iĝas pli simplaj kaj konvencijaj aperas la **ideogramoj**. La komunika celo bezonas ekonomion de formoj uzotaj kaj precipe konvencion, tio estas, ke ĉiu membro de la komunumo ĉiam uzu la samajn rimedojn por esprimi la samon. En tiu momento aperas la **socia konsidero** ĉe la uzo de la skribado. Plie, la ideogramoj faras gravan paŝon en la adekvatiĝon al la lingvo, ĉar ĉiu desegno komencas stari por unu konkreta ideo aŭ koncepto. Ideogramoj evoluis en **logogramojn** (tiujn de la ĉina, ekzem-

ple), kiuj spegulas tute lingvan realon, jen vortojn aŭ morfemojn. El **bilda** origino, la ĉinaj logogramoj simpliĝis per la uzo de ĉiam pli konvencia kaj simpla formo, kion montras la uzo de kvadrataj formoj kaj de strekoj por faciligi la tajpadon (Il. 2).



Il. 2

### Plia decida paŝo al simpliĝo kaj konvenciĝo

Kiam la signoj adekvatiĝas al la plej bazaj elementoj de la lingvo, tio estas, la sonoj, aperas la **silabaroj**, kaj poste, kiel plia evoluo, la **alfabetoj**. Por ekspliki la originon de la silabaj skribo-sistemoj (la japana, ekzemple), oni uzas la rebusan teorion, kiu asertas ke la evoluo okazis kiam difinitaj ideogramoj aŭ logogramoj komencis esti uzataj por aliaj vortoj enhavantaj la sonojn kiujn ili signas. Tio signifas, ke por skribe prezenti novan realon ne plu necesis krei novajn bildojn, sed adaptojn de la jam ekzistantaj.

				A	A
				P	R
				N	N
				S	S
				B	B

Il. 3

Pri la apero de la semidaj alfabetoj ekzistas kurioza hipotezo (Il. 3) surbaze de la fenicaj liternoj, kiu konektas la egiptajn hieroglifojn kun la origino de la konsonanta skribado. Ĝi asertas, ke -post formo-simpligo- oni donis konsonantan valoron al signoj pruntitaj el la prasinaja skribado por konsistigi ian **fonetikan** skribo-sistemon, tio estas, alfabeton. Tiu valoro devenis el la komenca sono de la vorto, kiun ili signis, tio estas, oni donis, ekzemple, la konsonantan valoron (b)

al la signo kiu staris por "domo", elparolita "bet". Se tamen la fenicoj ne inventis tiun sistemon laŭ tiu maniero, oni ne povas nei, ke ili ja disvastigis sian alfabeton tra la tuta Mediteraneo. La grekoj aldonis la vokalojn kaj la latina polurado postvivis nian tempon: ja temas (pro ne lingvistikaj kialoj) pri la plej internacia skribo-sistemo, kiun, ne vane, uzas Esperanto.

*Alberto Franco*

ni  
transi  
mi volas transi  
mi volas elvivi  
mi volas aldrivi

vin  
nube  
gase  
polve  
mole  
use

kaj droni vin  
sinki vin  
morti vin  
vaki vin  
nuli vin  
min  
nin



## Originala Poezio

SALNEVO  
jan. 92.

# Boletín

mi amas vin

## LIBROSERVO DE HEF

Atentu, ke la Libroservo havas  
apartan konto-numeron ĉe Caja Postal.

n<sup>o</sup>: 3.118.078

### FUNDACIÓN ESPERANTO

Sekretario: Enrique Piquero  
San Vicente de Paul, 1, 1<sup>o</sup>.  
50001 ZARAGOZA

*Libroservo de H.E.F.*  
Luis Hernández García  
Apartado 119  
47080 VALLADOLID

### UTILAJ ADRESOJ


### I.L.E.I.

Sekciestro: Manuel López  
Apartado 832  
41080 SEVILLA

### H.E.J.S.

Prezidanto: Iñaki Gauna  
Domingo Beltran, 42, 4<sup>o</sup> D.  
01012 GASTEIZ-VITORIA

Depósito legal: Z-334-90  
Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas



# Boletín

de la Federación Española de Esperanto

---

Hoja Informativa en Castellano

Nº 1. Agosto-Septiembre 1992

---



Aquí tienes en tus manos el primer número de la hoja informativa que esta Federación confecciona para mayor difusión de las noticias más importantes que respecto a la interlengua Esperanto se producen tanto a nivel nacional como internacional.

Con ello se pretende mantener informados al respecto también a aquellos que aún no dominan completamente la lengua internacional o que simplemente se interesen por el tema.

Con estas páginas se intentará ofrecer una muestra relevante de lo que la cultura y actividades esperantistas pueden aportar a un

mundo que, como el actual, se ve envuelto en la gran diversidad de idiomas que al mismo tiempo que constituyen una riqueza irrenunciable suya, le dificultan la cada vez más necesaria y apremiante necesidad de comunicación y comprensión mutuas transnacionales.

Y nos complace terminar nuestra presentación invitando a todos aquellos que deseen colaborar en la finalidad de este Informativo a que remitan a su Redacción sugerencias, noticias o las aportaciones que estimen importantes. Gracias.





## DINERO, DINERO...

Para que a partir de un original en inglés produzca la ONU un documento de 25 páginas en todas sus lenguas de trabajo, hacen falta 63,9 días de traducción, 22,9 días de revisión y 12 días de escritura a máquina, lo que hace un

total de 98,8 días. ¡Casi 100 días para comunicar a todos los miembros de la ONU el contenido de un documento de 25 páginas!

Y respecto a los costes en dólares de la traducción de ese documento: Árabe, 3.200; chino, 4.480; francés, 2.240; alemán, 5.320; español, 2.240; ruso, 2.436. En total, \$19.936: ¡Cerca de 20.000 dólares para poner a la disposición de todos sus miembros un documento de 25 páginas!

En contraste, la "Asociación Universal de Esperanto" (UEA), con una audiencia tan multilingüe como la del conjunto de los estados de la ONU, invierte 0 días y 0 dólares para obtener el mismo resultado.

*(De International News, Londres)*

---

## ESPERANTO Y UNIVERSIDAD

El Curso de Esperanto del Instituto de Idiomas de la Universidad de Santiago de Compostela proyecta poner en marcha en 1993 -con ocasión del 78º Congreso Universal de Esperanto que se celebrará en Valencia- unos Cursos Preuniversitarios Internacionales en Esperanto, impartidos por profesorado internacional a alumnado también internacional.



Además del apoyo institucional ya iniciado por la citada universidad, se están recibiendo otras ayudas y colaboraciones para ver de garantizar el éxito de la empresa.




## EN LAS ONDAS

El año pasado hubo más de 5.400 emisiones radiofónicas en Esperanto en todo el mundo. Países como Austria, Suiza, Brasil, China, Hungría, Italia, Vaticano, Croacia, Serbia, Cuba, Polonia, Lituania y Estonia emitieron en y sobre Esperanto a través de sus emisoras más prestigiosas.

Las de onda corta son fácilmente captables aquí. ¡Solicítanos información sobre horario y frecuencias!



## LIBROS, REVISTAS, CASSETES



Esta Federación ofrece sus servicios de libros y material audiovisual en y sobre el Esperanto.


Los pedidos son rápidamente atendidos contra reembolso.

Solicite catálogo y otra información a

LIBRO-SERVO DE HEF  
Apartado 119  
47080-VALLADOLID.

— LIBROSERVO DE HEF —

# 300 TÍTULOS AL AÑO



Aproximadamente un nuevo título/libro en Esperanto aparece cada día en algún lugar del mundo.

Aunque su temática abarca un amplio espectro (ya sean traducciones o libros escritos originalmente en Esperanto), predomina por lo general la narrativa.

*(De "Internacia Lingvo" Bilbao)*

# Kiĥoto-92

**DON QUIJOTE-92**

**Esperanto  
en ĉiu publika biblioteko  
danke al Don Quijote**


La "Fundación Esperanto" ha organizado una campaña para que en las bibliotecas públicas de nuestro país exista al menos un ejemplar del Quijote en la magistral traducción al Esperanto de Fernando de Diego.

La Fundación subvenciona con 1.000 pesetas la compra de cada ejemplar que los particulares, sociedades o grupos quieran comprar para enviarlos como donativo a las bibliotecas que indiquen.

La remisión a la biblioteca puede ser realizada directamente desde el "Servicio de Libros" de la Federación, bastando para ello remitir al Servicio o a la Fundación 3.000 pesetas por cada ejemplar, así como las señas de las bibliotecas.

El precio ordinario de la obra es de 4.000 pesetas.

## UTILIDAD PUBLICA



El Ayuntamiento de Madrid, en sesión plenaria celebrada el 19 de noviembre de 1.991, concedió al "Liceo Madrileño de Esperanto" el status de asociación de utilidad pública.

El Liceo se ha convertido así en la primera asociación esperantista española que consigue un reconocimiento de este tipo.

Buena noticia para el año de la capitalidad cultural europea.

*"De Mozart ĝis Eurokka  
MUZIKO kaj ESPERANTO  
Kompliceco de du internaciaj lingvoj"*



## ROCK SIN FRONTERAS

Un nuevo magazine de rock ha aparecido en escena. Todo en Esperanto y publicado por "EUROKKA" (la cual proyecta igualmente la edición de discos de conocidos grupos musicales esperantistas).

Con el lema "De Mozart a Eurokka", música y Esperanto. Complicidad de dos lenguas internacionales", ha tenido lugar del 17 al 21 del pasado mes de Abril, un encuentro de los esperantistas amantes de la música en Burdeos, en el que se incluyeron conciertos de rock con texto en Esperanto.

A quienes se interesen por este tema pueden pedir información: François Sendrey.- 171, rue Salvador Allende, F-33130 BEGLÈS. Francia.

## PASAPORTE AL MUNDO



Ya ha aparecido la nueva edición del "Pasporta Servo". Los esperantoparlantes que compren esta gufa pueden encontrar alojamiento gratuito en más de 1.000 lugares repartidos por 59 países de todo el mundo.



La posibilidad de familiarizarse con la vida y costumbres de otros países ha sido siempre uno de los grandes atractivos del Esperanto.




**¡Hazte con tu ejemplar del "Pasporta Servo"!**



## ESTE VERANO A VIENA

Los congresos de Esperanto (de los que se celebran unos 300 cada año, bien a nivel nacional, internacional o especializados, etc.), ofrecen una oportunidad inmejorable para comprobar la eficacia de nuestra lengua y conocer, sin barreras comunicativas, gentes de otras latitudes.

### VIENO




Konstanta adreso: 77-a UK de Esperanto  
Nieuwe Binnenweg 176  
3015 BJ Rotterdam, Nederlando  
Poŝtigra konto: 62 73 37 (Centralo Den Haag)  
AmRo Bank, Rotterdam: konto 42.69.01.444

Del 25 de julio al 1 de agosto de este año acogerá la ciudad de Viena al 77 Congreso Universal de Esperanto, máximo exponente anual de la cultura que se va creando con la interlengua Esperanto.

Y una buena noticia: Ya ha sido designada la ciudad de Valencia como sede del 78º Congreso Universal, en el verano de 1.993.


## ESPERANTO EN CANAL SUR



Miguel Fernández, traductor de García Lorca y M. Hernández al Esperanto, fue entrevistado recientemente en el magazine del mediodía de "Canal Sur" acerca de su tarea de traducción de estos famosos líricos, y nos sorprendió a todos con su interpretación de las canciones lorquianas traducidas por él.

Miguel Fernández, acaba de obtener un éxito resonante en la representación de su propia obra lírica "El perfil de tus huellas" en el marco del 52º Congreso Nacional de Esperanto celebrado a primeros del pasado mes de mayo en Mérida.

# DIRECCIONES DE INTERÉS



*FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO.* Oficina Central para atender cualquier tema de Información: C/ Rodríguez de San Pedro, 13.-3º. P-7. 28015-MADRID. Teléfono permanente: 91-446807.

*Asociación Aragonesa de Esperanto "Frateco";* C/ San Vicente de Paul, 1.- 1º E. 50001-ZARAGOZA.

*Asociación Andaluza de Esperanto.*- Apartado 864. 29080-MALAGA.

*Asociación Asturiana de Esperanto.*- Cátedra Jovellanos de Extensión Universitaria. C/Begoña, 25. 33206-GIJON.

*Asociación Cantabra de Esperanto.* Apartado 2240.39080-SANTANDER

*Asociación Catalana de Esperanto.* Apartat 407. 08280-SABADELL.

*Asociación Vasca de Esperanto.* Zapatería, 29. 01001-VITORIA-GASTEIZ.

*Federación Valenciana de Esperanto.* Fernando el Católico, 45. 3º. 45008-VALENCIA.

*Centro Barcelonés de Esperanto.* Carreras Candi, 34-36. 08028- BARCELONA.

*Curso de Esperanto.* Instituto de Idiomas. Facultad de Filología. 15701-SANTIAGO DE COMPOSTELA.

*Liceo Madrileño de Esperanto.* Atocha, 98. 4º. 28012-MADRID.

*Sociedad Esperantista ESTO.* Apartado 53. 38201-LA LAGUNA.

*Servicio de Libros.* Apartado 119. 47080-VALLADOLID.

*Redacción de "Boletín",* órgano de HEF.: Av.Compromiso de Caspe, 27/29. 9º. C. 50002-ZARAGOZA.

*Redacción del Informativo en español:* "Boletín". C/Santa Rosa, 26. 5º.C. 15701-SANTIAGO DE COMPOSTELA.